KONSTITUA DOKUMENTO KAJ STATUTOJ DE LA VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO

1977

KONSTITUA DOKUMENTO KAJ STATUTOJ
DE LA VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO

Octavio de Diego, venezuela civitano, industriiisto, edziĝinta, ĉi-domicila kaj kun identiga karto Nº 1893295; Félix García Blázquez, venezuela civitano, ingeniero, edziĝinta, ĉi-domicila kaj kun identiga karto Nº 1897262; Lino Moulines, venezuela civitano, librovendisto, edziĝinta, ĉi-domicila kaj kun identiga karto Nº 1715010, kaj J. E. Bachrich, venezuela civitano, administratoro, edziĝinta, ĉi-domicila kaj kun identiga karto Nº 946074.

DEKLARAS

Ke ni interkonsentis starigi, kaj fakte starigas, civilan societon sen profitaj celoj, kiu funcios laŭ la klauzoj de ĉi tiu konstitua dokumento, tiel redaktita ke ĝi samtempe funkciu kiel Statutoj de la Asocio.

ANTAŬPAROLO

Tiun ĉi Societon animas la fundamenta principon stimuli la spiriton de amikeco kaj interkompreno inter la diversaj popoloj de la Tero, per la utiligo de Esperanto, internacia lingvo neŭtrala, kies pretendoj estas ne anstatŭi la lingvojn naciajn kaj regionajn, sed kontraŭe ĝin utiligi kiel komunikilon inter personoj kaj Institucioj kun malsamaj lingvoj. Tiaj idealoj kongruas kun tiuj de UNESCO kaj ONU, kiel agnoskas la Rezolucio de la Ĝenerala konferenco de UNESCO (Montevideo 1954), en kiu okazo formaliĝis la konsultaj rilatoj kun la ĉefa institucio de la monda esperantismo.

ĈAPITRO I: ĜENERALAĴOJ

Artikolo I: Nomoj kaj celoj

La nomo de tiu ĉi organizaĵo estas: Venezuela Esperanto-Asocio (Civila Societo sen profitaj celoj), kaj ĝia objektivo estas la diskonigo de la lingvo internacia kreita de D-ro Lazaro L. Zamenhof. Ĝi konstituas la leĝan formaligon de la Asocion sennoma fondita en Maturin, 1912, de Don Benito Lozada kun kun klera grupo de Eseprantistoj.

Artikolo II: Sidejo

La Asocio fiksas sian leĝan domicilon en la urbo Karakaso, kaj povas starigi filiojn en iu ajn loko de la Respubliko.

Artikolo III: Agadoj

Por la plenumo de sia celo, la Asocio realigos la jenajn agadojn:

a) Aranĝi kursojn kaj prelegojn por la diskonigo de la lingvo internacia;
b) Klopodi akiri de la publikaj instancoj la rimedojn necesajn por la diskonigo de Esperanto kaj por la adopto de ĉi tiu lingvo en la instruprogramoj;
c) Eldoni la oficialan organon de la Asocio, informajn broŝurojn kaj, ĝenerale, literaturaĵojn en la internacia lingvo;
d) Aŭspicii la kreadon de grupoj analogaj en la tuta lando, ilin konsili kaj atingi ilian aliĝon al la Asocio;
e) Okazigi naciajn kunvenojn de landaj kaj eksterlandaj esperantistoj;
f) Diskonigi en la internaciaj medioj la venezuelan kulturon kaj en Venezuelo la kulturojn alilandajn;
g) Entrepreni ajnan alian agadon por la atingo de la celoj meciitaj en la Artikolo I.

Artikolo IV: Neutraleco

La Venezuela Esperanto-Asocio sin deklaras neŭtrala rilate politikon, religión, kredon, rason, nacieron kaj doktrinon, kvamkam aliĝas al la Deklaracio pri Homa Rajtoj de la Organizacio de la Unuigintaj Nacioj.

Artikolo V: Propraĵaro

La propraĵaro formiĝos per la havaĵoj posedataj en la momento de la starigo de la Asocio, per la kontribuoj de ties asocianoj kaj simpatiantoj kaj per aliaj kontribuoj pri kies akcepto decidos la Estraro.

ĈAPITRO II: PRI LA MEMBROJ

Artikolo VI: Ĝeneralaj devoj de la Membroj:

Respekti kaj observi la principojn de la Asocio, laŭpove kunlaborante por la plenumo de ĝia programo. Ili devas pagi la koncernajn kotizojn, konforme al sia kategorio, laŭ la jenaj aritkoloj:

Artikolo VII: Ĝeneralaj rajtoj de la Membroj

Partopreni en la agadoj de la Asocio kaj uzi ĝiajn servojn, konforme al tio, kion fiksos la Interna Regularo.

Artikolo VIII: Listigo de la Membro-kategorioj

Oni starigas la jenajn membro-kategoriojn: Aktivaj, Honoraj, Kolektivaj kaj Simpatiantaj.

Artikolo IX: Aktivaj Membroj

Aktivaj Membroj estas tiuj akceptitaj en tiu karaktero fare de la Estraro kaj kiuj konas la lingvon Esperanton. Ili rajtas partopreni en ĉiuj agadoj de la Asocio, kaj eĉ esti elektata estraranoj. Ili devas pagi la bazan kotizon fiksotan de la Asembleo.

Artikolo X: Honoraj Membroj

Honoraj Membroj estas tiuj, kiuj farinte meritplenan servojn al la Asocio aŭ al la Esperanto-ovado, indas tian titolon. La nomumado koncernas la Asembleon, laŭ propono de la Estraro, aŭ de almenaŭ kvin membroj de la Asocio. Honoraj Membroj ne estas devigataj pagi iun ajn kotizon.

Artikolo XI: Kolektivaj Membroj

Kolektivaj membroj estas tiuj apartenantaj al lafilioj de la Asocio. Ili rajtas ricevi la bultenojn kaj ceterajn informajn presaĵojn de la Asocio. Ili ne pagas iun kotizon rekte al la Asocio, sed la filioj devas pagi kotizon proporcian al a nombro de sian membroj, kiun kotizon fiksos la Asocia Estraro.

Artikolo XII: Membroj Simpatianoj

Membroj Simpatianoj estas tiuj, kiuj interesiĝas pri la studado kaj aŭ diskonigado de la lingvo. Ili rajtas ricevi en la Asambleoj kaj povas esti elektajtaj kiel voĉanoj de la Estararo. Ili devas pagi laŭvolan kotizon, sed neniukaze pli malaltan ol 50% de la baza kotizo fiksita de la Asembleo. La Interna regularo divinos la kondiĉojn necesajn por ke Membro Simpatianta povu leviĝi al la kategorio de Membro Aktiva.

Artikolo XIII: Specialaj senŝarĝigoj

Laŭ siaopinie konvenaj kondiĉoj, la Asamblea povos konsenti rabaton ĝis 50% de la baza kotizo por la Membroj Aktivaj sub la aĝo de 25 jaroj.

Artikolo XIV: Disciplina reĝino

La membroj ŝuldantaj pli ol dekdu monatajn kotizojn perdos la rajton voĉdoni en la Asembleoj.

La estraro povos suspendi maksimume dum unu jaro iun ajn membron aktivan, kiu ne plenumas siajn devojn aŭ agas laŭ maniero kontraŭa al la celoj de la Asocio.

La punsankcioj pli grandaj ol la supre indikitaj estos decidataj en eksterordinara Asembleo, per aserta voĉdono de 51% de la membroj ĉeestantaj por la suspendoj super unu jaro, kaj de 67% por eksigoj.

ĈAPITRO III: PRI LA ORGANIZO

Artikolo XV: Ĝeneralaĵoj

La direktadon kaj administradon de la Asocio prizorgos la Estraro konstituita de unu Prezidanto, unu Vic-Prezidanto, unu Ĝenerala Secretario, unu Protokol-Sekretario, unu kasito, kaj voĉanoj laŭ la nombro kiun la Asembleo konsideros konvena.

La funkcioj daŭros du (2) jarojn, kaj la funkciuloj povos esti reelektataj.

Artikolo XVI: Funkcioj de la Estraro

a) Reprezenti kaj administri la interesojn de la Asocio.
b) Plenumi ĉiujn leĝajn agadojn proprajn al la Asocio.
c) Efektivigi la rezoluciojn de la Asembleo.
d) Ellabori la jaran agadprogramon.
e) Kunvoki ordinarajn kaj eksterordinarajn Asembleojn.
f) Akcepti aŭ malakcepti la aspirantojn al membreco.
g) Solvi ian ajn aferon ne antaŭviditan en ĉi tiu dokumento.
h) Redakti sian propran Internan Regularon.

Artikolo XVII: Funkcioj de la Estraranoj

La funkcioj de ĉiu Estrarano estas indikitaj en la artikoloj 19ª ĝis 25ª.

Artikolo XVIII: Prezidanto

a) Kunordigas la agadojn de la Estraro kaj prezidas ĝiajn kunvenojn.
b) Reprezentas la Asocion en iu ajn demarŝo ĉe publikaj kaj privatajn en ĉi tiu dokumento.
c) Plenumas la ceterajn oficojn proprajn al sia posteno, indikitajn en ĉi tiu dokumento.

Artikolo XIX: Vic-Prezidanto

Kunlaboras kun la Prezidanto en la plenumado de liaj funkcioj kaj lin anstataŭas dum lia foresto.

Artikolo XX: Ĝenerala Sekretario

a) Informas la Estraron pri la korespondaĵoj ricevitaj kaj senditaj.
b) Redaktas la rutinan korespondaĵon kaj subskribas, kune kun la Prezidanto, la eksterajn dokumentojn de la Asocio.
c) Revizias la protokolredaktadon.

Artikolo XXI: Protokol-Sekretario

a) Faras notojn pri la kunvenoj, por redakti la koncernan protokolon.
b) Kunlaboras kun la Ĝenerala Sekretario en liaj pluraj celoj.

Artikolo XXII: Kasisto

a) Direktas la monkolektadon kaj la kapitaladministradon.
b) Zorgas la librotenadon de la Asocio.
c) Redaktas la jaran ekonomian informon.
d) Ellaboras la buĝeton por la concerna periodo.

Artikolo XXIII: Voĉanoj

Plenumas la specifan taskojn decidotajn de la Estraro. Devos akzisti minimume unu Voĉano por ĉiu jena agado: Biblioteko, Instruido, Prelegoj kaj Eldonaĵoj.

ĈAPITRO IV: ASEMBLEOJ

Artikolo XXIV: Ĝeneralaĵoj

La Asembleo estas la supera debatanta organo de la Asocio, kaj konsistas el la Aktivaj Membroj balotrajtaj.

Artikolo XXV: Funkcioj de la Asembleo

a) Elekti la Estraron kaj decidi pri ties rezigno.
b) Jare informigi pri la agado de la Estraro kaj kosideri ĝiajn raporton kaj konton.
c) Liveri la direktivojn por la Interna Regularo de la Asocio kaj redakti sian propran regularon.
d) Solvi la aferojn proponitajn kiuj bezonas ĝian intervenon.

Artikolo XXVI: Kvorumo de la Asembleoj

La kvorumon de la Asembleoj kaj ordinaraj kaj eksterordinaraj formos la 50% de la Aktivaj Membroj solventaj.

Artikolo XXVII: Asembleoj ordinaraj

La Asembleon ordinaran kunvekos la Estraro dum la du lastaj monatoj de ĉiu jaro. Se oni ne atingas la kvorumon, oni ekinstalos, post unu horo, Asembleon kiu validos kun iu ajn nombro da membroj ĉeestantaj.

Artikolo XXVIII: Asembleo eksterordinara

Kiam la Estraro ĝin konsideros konvena, aŭ kiam tion skribe petos minimume la 25% de la aktivaj membroj, Asembleo eksterordinara estos kunvokata kun dutaga anticipo per loka ĵurnalo. Se oni ne atingas la kvorumon, la subjekton, kiu estas celo de la kunvoko, oni pritraktos en la sekvanta Asembleo ordinara.

ĈAPITRO V: FINAJ DISPOZICIOJ

Artikolo XXIX: Daŭro kaj malfodo

La Asocio havos naŭdeknaŭjaran daŭron. Oni ne povos ĝin malfondi dum ekzistas membroj pretaj ĝin subteni. Okaze de malfondo, la Estraro nulitos la pasivon, kaj donacos sian havon al iu kutura asocio.

Artikolo XXX: Modifo de tiu ĉi dokumento

Tiu ĉi dokumento povos esti modifata de la Asembleo per decido de la absoluta plimulto de la ĉeestantaj membroj balotrajtaj.

Artikolo XXXI: Provizora dispozicio

Ĝis la Asembleo okazonta en la jaro 1977ª, restas nomumitaj la jenaj personoj: Prezidanto, S-ro Octavio De Diego; Vic-Prezidanto, S-ro Floral Gabaldá; Kasisto, S-ro Manuel Nebra-Val; Ĝenerala Sekretario, S-ro J. E. Bachrich; Eldona Direktoro; S-ro Félix García Blázquez; Biblioteko; S-ro Jorge Mosonyi; Voĉanoj, Ges-roj César Manzano, Esteban Mosonyi, Agnés de Valdman, Andrea Turrisi kaj Víctor Hernández.

Karakaso, la sepan de Novembro de mil naŭ cent sep de kvin.